Ĉapitro 10 – Gufujo

Enhavo

1. Novaj vortoj
2. Novaj gramatikaĵoj
3. La rakonto
4. Enhavaj demandoj
5. Tabelekzercoj
6. Plenigekzercoj
7. Respondekzercoj

Novaj vortoj por ĉapitro 10

afiŝo	feminismo	oficiala
akvo	festivalo	pendi
arto	fondi	popo
atendi	forta	rajto
bando	forumo	reprezenti
biciklo	gitaro	sekcio
cetere	gvidi	seminario
diskuti	instanco	sento
ekskurso	kampo	streĉi
ekspozicio	karavano	titolo
ekvilibro	kontrasto	ttt (tut-tera teksaĵo)
eventuale	moderna	vasta
fali	morgaŭ	

Novaj gramatikaĵoj por ĉapitro 10

(En ĉi tiu ĉapitro ne estas iuj novaj gramatikaĵoj.)

Ĉapitro 10.1 – Gufujo

En la Gufujo

Jesi: Ĉu estas libera loko?

Ina: Jes, certe.

Jesi: Tre agrable ĉi tie en la gufujo. Mi bezonas iom da trankvilo post tre streĉa tago.

Ina: Mi komprenas. La etoso en gufujo estas tre bona kontrasto al la aliaj okazaĵoj dum IJK, ĉu ne?

Jesi: Jes. Mallaŭta muziko, trankvila babilado kaj iu interesa teo. Perfekte por rehavi fortojn…

Ĉapitro 10.2 – Gufujo

Ina: Vi ŝajnas ege laca. Kion vi faris dum la tuta tago?

Jesi: Unue mi faris afiŝon por la morgaŭaj ekskursoj. Cetere, ĉu vi iros al iu ekskurso?

Ina: Jes, al la granda akvofalo kaj poste al ekspozicio pri moderna arto.

Jesi: Bona elekto. Ankaŭ mi iros tien. Ĉiukaze, post la pendigado de la ekskursafiŝoj mi gvidis diskutrondon kun la titolo ‘Ĉu feminismo samas en diversaj landoj?’. Estis tre interesa kaj vigla diskuto. Kaj dum la lastaj kvin horoj mi estis en longa komitatkunsido. Vere estis tro longa, sed nun la komitato finkunsidis.

Ĉapitro 10.3 – Gufujo

Ina: Ha, vi do estas komitatano?

Jesi: Jes, kaj mi ankaŭ estas en la estraro de TEJO.

Ina: Mi neniam estis tre aktiva en la movado… Fakte kio estas la ĉefa agado de TEJO nun?

Jesi: Ĝi estas vasta. En plej diversaj kampoj ni havas agadon, ekzemple seminarioj pri homaj rajtoj kaj interkulturaj rilatoj, biciklkaravanoj, lingvaj festivaloj, konstruado de ttt-paĝoj ktp. Ni ankaŭ estas reprezentitaj en diversaj oficialaj instancoj kiel Forumo Junulara Eŭropa, UNESKO kaj la junulara sekcio de Unuiĝintaj Nacioj.

Ina: Sonas interese. Tamen por mi sufiĉas esperantumi unu aŭ du semajnojn jare.

Ĉapitro 10.4 – Gufujo

Jesi: Jes, oni trovu sian ekvilibron… Ĝuste nun mi sentas, ke estas tro da Esperanto en mia vivo… Ĉu vi estas membro de iu alia organizo?

Ina: Ne vere organizo, sed mi ludas gitaron en bando.

Jesi: Bele! Mi tre ŝatas kanti. Kian muzikon vi ludas?

Ina: Nu, estas simpla popo. Ni ĵus fondis la bandon, sed eventuale ni ludos dum la venonta IJK…

Jesi: Mi jam antaŭĝojas! Nur diru, se vi bezonas iun helpkantiston.

Ina: Kial ne?! Eble vi volas kanti ion nun, kaj mi povas ludi gitaron?

Jesi: Jes, mi ŝatus tion.

Ina: Tre bone, mi tuj venigos mian gitaron.

Jesi: Mi atendas vian espereble rapidan revenon…

Demandoj pri ĉapitro 10

Diru al mi:

1. Kiuj renkontiĝis en la gufujo?
   - Kabe kaj Ina.
   - Ina kaj Jesi.
   - Jesi kaj Kabe.

2. Kial Jesi estas laca?
   - Ĉar ŝi tro multe dancis.
   - Ĉar ŝi malbone dormis.
   - Ĉar ŝi laboris dum la tuta tago.

3. Kien ekskursos Ina kaj Jesi?
   - Ili ekskursos al la komitatkunsido.
   - Ili ekskursos al la granda akvofalo kaj ekspozicio.
   - Ili ekskursos al la nacia muzeo.

4. Kiu estas en la estraro de TEJO?
   - Kabe.
   - Jesi.
   - Ina.

5. Kiu ŝatus esti helpkantisto?
   - Ina ŝatus.
   - Neniu ŝatus.
   - Jesi ŝatus.

6. Kian muzikon ludas la bando de Ina?
   - Rokon
   - Punkon.
   - Ĵazon.
   - Popon.

Plenigekzerco pri ĉapitro 10

Via tasko estas plenigi la malplenan spacon (liniojn) per ĝustaj vortoj. Vi povas elekti vortojn nur el la listo kiu sekvas post "Vortoj:". Sukceson!

Vortoj: **kial, kiam, kiu, ĉiu, kiom, neniam, ĉiuj, tiu, kiel, tiom, tio, kie**

_____ estas la plej taŭga loko, _____ eblas ripozi kaj rehavi fortojn. Kabe _____ forgesos la kongreson. _____ knabino, pri _____ vi parolas, preskaŭ _____ estas en la trinkejo. Ina rakontis al Kabe, _____ funkcias Pasporta Servo. _____ vi lernos la lingvon, mi rekomendos al vi bonajn librojn. En _____ jaro al IJK kutime venas multaj homoj kaj ili preskaŭ _____ parolas Esperanton. Bedaŭrinde mi ne havas _____ da mono, _____ mi bezonas por la vojaĝo. Nun li scias, _____ Kabe forlasis Esperanton.

Respond-demand-ekzerco pri ĉapitro 10

Jen respondoj. Kompletigu la demandojn tiel, ke ili rilatu al la grasa frazero.

Ekzemploj:

1)	Je **la unua** horo ni iros al la ekskurso.	Je **kioma** horo ni iros al la ekskurso?
2)	Vespere estas tre agrable **en la gufujo** .	**Kie** estas tre agrable?

Faru mem:

1)	Vespere estas **tre agrable** en la gufujo.	____ estas en la gufujo?
2)	**Vespere** estas tre agrable en la gufujo.	____ estas tre agrable en la gufujo?
3)	Ŝi faris **afiŝon por la morgaŭaj ekskursoj** .	____ ŝi faris por la morgaŭaj ekskursoj?
4)	Ŝi faris afiŝon por **la morgaŭaj** ekskursoj.	Por ____ ekskursoj ŝi faris afiŝon?
5)	Ni estas reprezentitaj **en diversaj instancoj** .	____ ni estas reprezentitaj?
6)	Ni estas reprezentitaj en **diversaj** instancoj.	En ____ instancoj ni estas reprezentitaj?

Ekzemploj:

1)	Ni neniam estis **tre aktivaj** .	**Kiaj ni neniam estis?**
2)	Li vizitis **diversajn instancojn** .	**Kion li vizitis?**

Faru mem:

1)	Li vizitis **diversajn** instancojn.	____
2)	Ni **neniam** estis tre aktivaj.	____
3)	Je **la unua** horo ni iros al la ekskurso.	____
4)	Tio sonas **interese** .	____
5)	**Jes** , tio sonas interese.	____

Ĉapitro 11 – Enamiĝoj?

Enhavo

1. Novaj vortoj
2. Novaj gramatikaĵoj
3. La rakonto
4. Enhavaj demandoj
5. Tabelekzercoj
6. Plenigekzercoj
7. Respondekzercoj

Novaj vortoj por ĉapitro 11

amo	feliĉo
bati	flirto
buŝo	radii
enamiĝo	speciala

Novaj gramatikaĵoj por ĉapitro 11

(En ĉi tiu ĉapitro ne estas iuj novaj gramatikaĵoj.)

Ĉapitro 11.1 – Enamiĝoj?

Du tagojn poste, ekster la dancejo

Ina: Ej, Kabe, vi aspektas feliĉega.

Kabe: Jes, mi estas!

Ina: Bele. Mi ĝojas! Ĉu la kongreso tiom plaĉas al vi?

Kabe: Jes kaj ne… Certe mi tre kontentas pri IJK, sed estas io alia, kio feliĉigas min. Pli ĝuste dirite, estas iu, kiu batigas mian koron.

Ina: Diru, diru, ĉu vi enamiĝis al iu knabino?

Kabe: Mi ne certas, ĉu mi jam enamiĝis, sed sentiĝas tre bone… Ŝi eĉ kisis min sur la buŝon dum labambo. Mirinde kian kison ŝi donis…

Ĉapitro 11.2 – Enamiĝoj?

Du tagojn poste, ekster la dancejo

Ina: Bonege! Nun mi komprenas kial vi elradias tiom da ĝojo. Fakte, io simila okazis al mi…

Kabe: Sed mi pensis, ke vi ne ŝatas labambumi.

Ina: Prave. Ne okazis en la dancejo, sed en la Gufujo. Kaj ne estis kiso, sed tamen io tre ĝojiga…

Kabe: Do, rakontu!

Ina: Mi ne scias kion diri vere… Nenio speciala okazis, almenaŭ ankoraŭ ne okazis. Sed mi iel sentis, ke ŝi tre ŝatas min kaj mi ŝin. Ni longe babilis pri muziko kaj poste kantis kune… Mi pensas, ke ŝi flirtumis kun mi, estis tre agrable.

Kabe: “Malfeke!”, kiel diras via amiko de Kanado.

Ina: Jes, vere! Mi esperas renkonti ŝin baldaŭ denove.

Kabe: Same mi…

Demandoj pri ĉapitro 11

Diru al mi:

1. Kial Kabe estas feliĉega?
   - Ĉar la kongreso estas bonega.
   - Ĉar li finfine manĝis.
   - Ĉar li eble enamiĝis.

2. Kio okazis dum labambo?
   - Knabino kisis Kabe sur la buŝon.
   - Ina enamiĝis.
   - Jesi kaj Ina ludis gitaron kaj kantis.

3. Ĉu Ina ŝatas labambumi?
   - Ne, ŝi ne ŝatas.
   - Jes, tre!

4. Kio ĝojigis Ina?
   - Kiso en la dancejo.
   - Labambumado.
   - Flirtumado en la gufujo.

5. Kion antaŭĝojas Ina kaj Kabe?
   - Reveni hejmen de la kongreso.
   - Rerenkontiĝi kun siaj novaj amatinoj.
   - Iri al la koncerto.

Plenigekzerco pri ĉapitro 11

Via tasko estas plenigi la malplenan spacon (liniojn) per ĝustaj vortoj. Vi povas elekti vortojn nur el la listo kiu sekvas post "Vortoj:". Sukceson!

Vortoj: **ekster, pro, ĝis, ĉirkaŭ, post, je, sen, antaŭ, dum**

_____ tre streĉa tago li aspektis laca. Ŝi komprenis eĉ _____ kiso, ke ŝi plaĉas al tiu knabino. La vojaĝo kostis _____ 50 eŭrojn. La malfermo de la kongreso okazos _____ la kvara horo kaj daŭros _____ la deka. _____ kelkaj monatoj li ankoraŭ ne sciis Esperanton. _____ la tuta nokto mi ne povis ekdormi _____ laŭta muziko. La muziko estis aŭdebla ne nur en la dancejo, sed ankaŭ _____ ĝi.

Respond-demand-ekzerco pri ĉapitro 11

Jen respondoj. Kompletigu la demandojn tiel, ke ili rilatu al la grasa frazero.

Ekzemploj:

1)	**Via** amiko rakontis ĉion pri viaj rilatoj.	**Kies** amiko rakontis ĉion pri viaj rilatoj?
2)	Via amiko rakontis ĉion pri **viaj** rilatoj.	Pri **kies** rilatoj rakontis via amiko?

Faru mem:

1)	Ili atendis **mian revenon** .	_____ ili atendis?
2)	Ili atendis **mian** revenon.	_____ revenon ili atendis?
3)	Ni renkontiĝis kun **nia malnova amikino** .	Kun _____ ni renkontiĝis?
4)	Ni renkontiĝis kun **nia** malnova amikino.	Kun _____ malnova amikino ni renkontiĝis?
5)	Ni renkontiĝis kun nia **malnova** amikino.	Kun _____ nia amikino ni renkontiĝis?
6)	Mi ne povis bone aŭdi **ŝian** voĉon.	_____ voĉon mi ne povis bone aŭdi?
7)	Mi ne povis **bone** aŭdi ŝian voĉon.	_____ mi ne povis aŭdi ŝian voĉon?
8)	Mi ne povis **bone aŭdi ŝian voĉon** .	_____ mi ne povis?

Ekzemploj:

1)	Li **nenion** volas scii pri via vivo.	**Kion li ne volas scii pri via vivo?**
2)	Mi enamiĝis al **via** fratino.	**Al kies fratino mi enamiĝis?**

Faru mem:

1)	Ŝi batigas **lian** koron.	
2)	Ŝi batigas **lian koron** .	
3)	Li enamiĝis al **via fratino** .	
4)	Li nenion volas scii pri **via vivo** .	
5)	Li nenion volas scii pri **via** vivo.	

Ĉapitro 12 – La lasta nokto

Enhavo

1. Novaj vortoj
2. Novaj gramatikaĵoj
3. La rakonto
4. Enhavaj demandoj
5. Tabelekzercoj
6. Plenigekzercoj
7. Respondekzercoj

Novaj vortoj por ĉapitro 12

ambaŭ

damne

desegni

impreso

komplike

konfuzo

lago

momento

plena

privata

proksima

ridi

sablo

sekundo

signo

stato

vizaĝo

Novaj gramatikaĵoj por ĉapitro 12

Sube vi trovas mallongan klarigon pri aferoj, kiuj aperas en la teksto.

Afiksoj

ge-	Montras ĉeeston de ambaŭ genroj.	**ge**amikoj

Ĉapitro 12.1 – La lasta nokto

Ĉe lago proksime de la kongresejo

Kabe: Ho, ankaŭ vi estas ĉi tie!?

Ina: Jes, mi renkontos amikon ĉi tie baldaŭ, por privata interparolo. Do, mi ŝatus peti vin foriri.

Kabe: Nu, tio ne eblas. Tute ne eblas, fakte.

Ina: Kial? Tiu ĉi renkonto estas tre grava por mi. Do, bonvolu lasi min sola.

Kabe: Kiel mi ĵus diris, tio ne eblas. Ĉar ankaŭ amiko de mi baldaŭ aperos ĉi tie.

Ina: Damne. Tipe, ke ĝuste nun… Fakte temas pri la knabino, pri kiu mi rakontis. Ŝia nomo estas Jesi, cetere.

Ĉapitro 12.2 – La lasta nokto

Jesi aperas

Jesi: Karaj! Bonege, ke vi povis veni, mi tiom ĝojas vidi vin denove! Sed… vi aspaktas ŝokitaj kaj iel konfuzitaj…

Kabe: Evidente…

Jesi: Do, mi supozas, ke vi jam ekkomprenis kiel statas, ĉu?

Ina: Mi nenion komprenas!

Kabe: Mi pensas, ke mi ne volas kompreni…

Jesi: Sed ne estas komplike! Lasu al mi klarigi. Kiam Ina rakontis al mi pri sia amiko, kiu lernis Esperanton tre rapide kaj nomiĝas Kabe, mi kaptis, ke vi du jam konas unu la alian.

Ina: Jes, sed…

Jesi: Sed kio?

Ĉapitro 12.3 – La lasta nokto

Kabe: Ni ambaŭ havis la impreson, ke vi flirtumis kun ni kaj…

Jesi: Tute prave! Pro tio mi volis paroli kun vi ambaŭ nun. Aŭskultu, mi petas. Mi ofte tre ŝatas plurajn personojn samtempe, ne gravas, ĉu estas viro aŭ virino. Kaj dum IJK okazis, ke mi enamiĝis al vi ambaŭ!

Kabe: Kaj ŝajne ni ambaŭ al vi…

Ina: Momenton, mi estas tiom laca, ke mi apenaŭ povas pensi. Ĉu mi ĝuste komprenis, ke…

Jesi: Jeees! Vidu:
Jesi kun ĝojplena vizaĝo desegnis grandan koron en la sablo kaj skribis en ĝi ‘I + J + K”.
Kabe post sekunda pripensado diris “Jen nia IJK” kaj ili ĉiuj ekridis!

Fino

Demandoj pri ĉapitro 12

Diru al mi:

1. Kie neatendite renkontiĝis Ina kaj Kabe?
   - En la amasloĝejo.
   - Ĉe lago.
   - En la gufujo.

2. Kial ili venis tien?
   - Por foriri de la kongresa bruo.
   - Por naĝi.
   - Por renkontiĝi kun Jesi.

3. Ĉu ekzistas du knabinoj kun nomo ‘Jesi’ en la IJK?
   - Jes.
   - Ne.

4. Kiaj estis Ina kaj Kabe kiam Jesi aperis?
   - Ŝokitaj kaj konfuzitaj.
   - Malsataj kaj dormemaj.
   - Ĝojigitaj kaj gajaj.

5. Kun kiu flirtumis Jesi?
   - Nur kun Ina.
   - Nur kun Kabe.
   - Kun kaj Kabe kaj Ina.

6. Kion ili ĉiuj faris je la fino?
   - Ili estis konfuzitaj 😐
   - Ili ridis ☺
   - Ili malĝojis ☹

Plenigekzerco pri ĉapitro 12

Via tasko estas plenigi la malplenan spacon (liniojn) per ĝustaj vortoj. Vi povas elekti vortojn nur el la listo kiu sekvas post "Vortoj:". Sukceson!

Vortoj: **an, for, ge, mal, ad, ĉj, um, ist, ind, ul, estr, iĝ, uj, aĵ, eg, ar, ej, ek, ig, nj, in**

Jesi enam_____is al ambaŭ_____jun_____oj, ĉar ŝi ŝatas flirt_____i kun pluraj personoj samtempe. I_____o kaj Ka_____o renkont_____is kun Jesi ĉe lago proksime de la kongres_____o. Ina volis, ke Kabe_____iru, ĉar ŝi atendis amik_____on. Esperant_____oj bon_____e komprenis unu la alian. Kelkaj kongres_____oj sidis en la Guf_____o kaj babilis pri la ag_____o de TEJO. Bedaŭr_____e ŝi ne aŭdis la plej gravan nov_____on, kiun diris la trinkej_____o. Post kiam Kabe desegnis koron kun la literoj "I+J+K" en la sablo ĉiuj_____ridis. Jesi estas en la estr_____o de TEJO. Liaj klar_____oj estis_____klaraj.

Respond-demand-ekzerco pri ĉapitro 12

Jen respondoj. Kompletigu la demandojn tiel, ke ili rilatu al la grasa frazero.

Ekzemploj:

1)	Tiu ĉi renkonto estas tre grava por **mi** .	Por **kiu** estas tre grava tiu ĉi renkonto?
2)	**Tiu ĉi renkonto** estas tre grava por mi.	**Kio** estas tre grava por mi?

Faru mem:

1)	Tiu ĉi renkonto estas **tre grava** por mi.	_____ estas tiu ĉi renkonto por mi?
2)	**Morgaŭ** mi venos al vi.	_____ mi venos al vi?
3)	Pro **tio** li volis paroli kun ni.	Pro _____ li volis paroli kun ni?
4)	**Pro tio** li volis paroli kun ni.	_____ li volis paroli kun ni?
5)	**Li** rapide diris sian nomon.	_____ rapide diris sian nomon?
6)	Li rapide diris **sian nomon** .	_____ li rapide diris?
7)	Li **rapide** diris sian nomon.	_____ li diris sian nomon?
8)	Li rapide diris **sian** nomon.	_____ nomon li rapide diris?
9)	Je la tria horo en la gufujo sidis **tri** personoj.	_____ da personoj sidis en la gufujo je la tria horo?
10)	Je **la tria** horo en la gufujo sidis tri personoj.	Je _____ horo en la gufujo sidis tri personoj?
11)	Je la tria horo **en la gufujo** sidis tri personoj.	_____ je la tria horo sidis tri personoj?
12)	Ili estas **tre aktivaj** .	_____ ili estas?
13)	Li ŝatas **aktivajn** homojn.	_____ homojn li ŝatas?

14)	Mi iros **al tiu kongreso** .	____ mi iros?

Postparolo

En la rakonto vi trovis kelkajn ekzemplojn pri kio povas okazi dum IJK. Sed ni rekomendas, ke vi iru al iu renkontiĝo por mem sperti la etoson! Vidu ĉe www.tejo.org/ijk por pli da informoj. Se vi estas pli ol tridekjara verŝajne pli interesas vin kio okazas en UEA - www.uea.org.

Cetere, kion vi pensas pri la rakonto kaj la kurso? Ni petas vin plenigi la demandaron pri tio, por helpi al ni plibonigi la kurson. Koran antaŭdankon!

Se vi volas esti en kontakto kun aliaj kursanoj, vi povas aliĝi al la retpoŝtlisto lernu-kursanoj.

Ili ekskursos al la granda akvofalo kaj ekspozicio.

4. Kiu estas en la estraro de TEJO?
   Jesi.

5. Kiu ŝatus esti helpkantisto?
   Jesi satus.

6. Kian muzikon ludas la bando de Ina?
   Popon.

Vortoj: **tiu, tiom, kie, ĉiuj, kiam, kiom, kiel, kial, ĉiu, neniam, tio, kiu**

Tio estas la plej taŭga loko, kie eblas ripozi kaj rehavi fortojn. Kabe neniam forgesos la kongreson. Tiu knabino, pri kiu vi parolas, preskaŭ neniam estas en la trinkejo. Ina rakontis al Kabe, kiel funkcias Pasporta Servo. Kiam vi lernos la lingvon, mi rekomendos al vi bonajn librojn. En ciu jaro al IJK kutime venas multaj homoj kaj ili preskaŭ ciuj parolas Esperanton. Bedaŭrinde mi ne havas tiom da mono, kiom mi bezonas por la vojaĝo. Nun li scias, kial Kabe forlasis Esperanton.

1)	Vespere estas **tre agrable** en la gufujo.	Kiel estas en la gufujo?
2)	**Vespere** estas tre agrable en la gufujo.	Kiam estas tre agrable en la gufujo?
3)	Ŝi faris **afiŝon por la morgaŭaj ekskursoj** .	Kion ŝi faris por la morgaŭaj ekskursoj?
4)	Ŝi faris afiŝon por **la morgaŭaj** ekskursoj.	Por kiaj ekskursoj ŝi faris afiŝon?
5)	Ni estas reprezentitaj **en diversaj instancoj** .	Kie ni estas reprezentitaj?
6)	Ni estas reprezentitaj en **diversaj** instancoj.	En kiaj instancoj ni estas reprezentitaj?

1)	Li vizitis **diversajn** instancojn.	**Kiajn instancojn li vizitis?**
2)	Ni **neniam** estis tre aktivaj.	**Kiam ni estis tre aktivaj?**
3)	Je **la unua** horo ni iros al la ekskurso.	**Je kioma horo ni iros al la ekskurso?**

4)	Tio sonas **interese** .	**Kiel tio sonas?**
5)	**Jes** , tio sonas interese.	**Ĉu tio sonas interese?**

Respondoj pri ĉapitro 11

1. Kial Kabe estas feliĉega?
   Car li eble enamigis.
2. Kio okazis dum labambo?
   Knabino kisis Kabe sur la buson.
3. Ĉu Ina ŝatas labambumi?
   Ne, si ne satas.
4. Kio ĝojigis Ina?
   Flirtumado en la gufujo.
5. Kion antaŭĝojas Ina kaj Kabe?
   Rerenkontigi kun siaj novaj amatinoj.

Vortoj: **ĝis, je, antaŭ, ĉirkaŭ, dum, sen, ekster, pro, post**

Post tre streĉa tago li aspektis laca. Ŝi komprenis eĉ sen kiso, ke ŝi plaĉas al tiu knabino. La vojaĝo kostis cirkau 50 eŭrojn. La malfermo de la kongreso okazos je la kvara horo kaj daŭros gis la deka. Antau kelkaj monatoj li ankoraŭ ne sciis Esperanton. Dum la tuta nokto mi ne povis ekdormi pro laŭta muziko. La muziko estis aŭdebla ne nur en la dancejo, sed ankaŭ ekster ĝi.

1)	Ili atendis **mian revenon** .	Kion ili atendis?
2)	Ili atendis **mian** revenon.	Kies revenon ili atendis?
3)	Ni renkontiĝis kun **nia malnova amikino** .	Kun kiu ni renkontiĝis?
4)	Ni renkontiĝis kun **nia** malnova amikino.	Kun kies malnova amikino ni renkontiĝis?
5)	Ni renkontiĝis kun nia **malnova** amikino.	Kun kia nia amikino ni renkontiĝis?
6)	Mi ne povis bone aŭdi **ŝian** voĉon.	Kies voĉon mi ne povis bone aŭdi?

7)	Mi ne povis **bone** aŭdi ŝian voĉon.	Kiel mi ne povis aŭdi ŝian voĉon?
8)	Mi ne povis **bone aŭdi ŝian voĉon** .	Kion mi ne povis?

1)	Ŝi batigas **lian** koron.	**Kies koron ŝi batigas?**
2)	Ŝi batigas **lian koron** .	**Kion ŝi batigas?**
3)	Li enamiĝis al **via fratino** .	**Al kiu li enamiĝis?**
4)	Li nenion volas scii pri **via vivo** .	**Pri kio li nenion volas scii?**
5)	Li nenion volas scii pri **via** vivo.	**Pri kies vivo li nenion volas scii?**

Respondoj pri ĉapitro 12

1. Kie neatendite renkontiĝis Ina kaj Kabe?
   Ce lago.
2. Kial ili venis tien?
   Por renkontigi kun Jesi.
3. Ĉu ekzistas du knabinoj kun nomo 'Jesi' en la IJK?
   Ne.
4. Kiaj estis Ina kaj Kabe kiam Jesi aperis?
   Sokitaj kaj konfuzitaj.
5. Kun kiu flirtumis Jesi?
   Kun kaj Kabe, kaj Ina.
6. Kion ili ĉiuj faris je fino?
   Ridis :-)

Vortoj: **mal, um, ar, an, eg, ind, ej, for, ul, in, ist, aĵ, nj, ge, ĉj, uj, estr, ek, ad, ig, iĝ**

Jesi enam ig is al ambaŭ ge jun ul oj, ĉar ŝi ŝatas flirt um i kun pluraj personoj samtempe. L nj o kaj Ka cj o renkont ig is kun Jesi ĉe lago proksime de la kongres ej o. Ina volis, ke Kabe for iru, ĉar ŝi atendis amik in on. Esperant ist oj bon eg e komprenis unu la alian. Kelkaj kongres an oj sidis en la Guf uj o kaj babilis pri la

ag[ad]o de TEJO. Bedaŭr[ind]e ŝi ne aŭdis la plej gravan nov[aj]on, kiun diris la trinkej[estr]o. Post kiam Kabe desegnis koron kun la literoj "I+J+K" en la sablo ĉiuj[ek]ridis. Jesi estas en la estr[ar]o de TEJO. Liaj klar[ig]oj estis [mal]klaraj.

1)	Tiu ĉi renkonto estas **tre grava** por mi.	[Kia]estas tiu ĉi renkonto por mi?
2)	**Morgaŭ** mi venos al vi.	[Kiam]mi venos al vi?
3)	Pro **tio** li volis paroli kun ni.	Pro [kio]li volis paroli kun ni?
4)	**Pro tio** li volis paroli kun ni.	[Kial]li volis paroli kun ni?
5)	**Li** rapide diris sian nomon.	[Kiu]rapide diris sian nomon?
6)	Li rapide diris **sian nomon** .	[Kion]li rapide diris?
7)	Li **rapide** diris sian nomon.	[Kiel]li diris sian nomon?
8)	Li rapide diris **sian** nomon.	[Kies]nomon li rapide diris?
9)	Je la tria horo en la gufujo sidis **tri** personoj.	[Kiom]da personoj sidis en la gufujo je la tria horo?
10)	Je **la tria** horo en la gufujo sidis tri personoj.	Je [kioma]horo en la gufujo sidis tri personoj?
11)	Je la tria horo **en la gufujo** sidis tri personoj.	[Kie]je la tria horo sidis tri personoj?
12)	Ili estas **tre aktivaj** .	[Kiaj]ili estas?
13)	Li ŝatas **aktivajn** homojn.	[Kiajn]homojn li ŝatas?
14)	Mi iros **al tiu kongreso** .	[Kien]mi iros?